# Korespondado de SES

#61

25-a de januaro, 2008

*Ne trompiĝu de la malespero,*
*Nek prifriponiĝu de l'espero!*

▷ Danke al sindono de la eksprezidanto s-ro GOTÔ Joŝiharu kaj s-ro NAKANO Cuneaki ni ĉiam informiĝis pri aferoj de nia societo dum kvin jaroj. Deĉijare por 2 jaroj mi, nova prezidanto, KIRIKAE Hideo redaktos nian poŝtokartan informilon. Se vi havos ion, kion vi deziras diskonigi al la membroj de SES, bonvolu kontakti min.

adreso: 3-7, Makomanai Kaŝiwaoka 9, Minami-ku,
Sapporo-ŝi, 005-0022
retadreso: esperanto.kirikae@nifty.com

▷ Membroj de Vinberoj sendis al Grego Suni en Tajvano, kiu estas kvin jaraĝa knabino kaj suferas je malfacila malsano denaske, 250 papergruojn, japaneskan jakon (*hantenon*) por knabino, kaj kukojn sur kies surfacoj estas presitaj japanaj literoj. Ŝia patro respondis la 30-an de decembro, ke kvankam diagnoze restas al ŝi tri-monata vivo, tamen ŝia nuna stato pliboniĝas. (Poste ŝia patro konigis al ili, ke, ve, la eta animo forpasis.)

▷ Vinberoj gratulis okazon de Zamenhofa Festo al esperantistoj en Universitato de Fremdaj Lingvoj en Tajvano. Ili raportis, ke en la festo 70 homoj partoprenis.

▷ Membroj de sabata lernkunsido eklegis en la unuan kunsidon en la kuranta jaro, la 19-an de januaro, francan novelon, *La Fremdulo*, verkitan de Albert Camus.

▷ Atenton! Ĝenerala kunsido de SES estos organizita en la ĉambro 320 de Kaderu 2·7 je 1:30 en la 2-a de februaro.